

N. N. 32,
Burĝonis rozarbedo

tradukita de Guido Holz

1. Burĝonis roz-arbedo
el delikata sin'
laŭ olda kant-heredo,
Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma flor'
dum frosta vintro-tempo
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,
mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata
laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,
amindas per parfum';
la nokton ĝi forpelas
per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto savas;
Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

N. N. 32,
Elkreskis
branĉeto

tradukita de Joachim Gießner

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,
roz- Jen ĉiamviva Rozo

*tradukita de Leland Bryant
Ross*

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profet'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun impet'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vintra
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
la menciita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Ŝi naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-arom'
Heligas per Digloro
la vojon de la hom'.
Ja homo, tamen Di',
ĝi ŝarĝojn malpezigas
Kaj homojn savas ĝi.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.